# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-45 sendita el Budapeŝto la 19an de oktobro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Désiré Rabevazaha – pioniro el Madagaskaro

Afriko funebras ekde la kvina de oktobro pro la forpaso de unu el siaj multjaraj aktivuloj, nome Désiré Rabevazaha Voavy en Madagaskaro (1940 – 2021). Désiré estis ŝtatoficisto, fondinto de Centro Internacia de Esperanto (CIE) kaj instruisto de Esperanto en lokaj universitato kaj lernejoj. Atendante la entombigon omaĝoj multiĝas al la homo, kiu estis sen-interrompe individua membro de pli ol 30 jaroj de UEA kaj ĝia faka delegito en Antananarivo pri instruado: E-o, franca, angla, komerco kaj turismo.




## La 44a revuo *Esperanto en Afriko*

p.1 Enkonduko kaj Nova distingo por Elysée Byelongo
p.2 *La Espero*, Esperanto-forcejo en Burundo
p.3 Nova Esperanto-Klubo en Shanje, DR Kongo
p.4 Reveno de Esperanto en Zimbabvo
p.5 Afrikaj virinoj elpaŝas publike; Alvoko pri projekto-kreado
p.6 Senegalo invitas vin jarfine 2022
p.7 Internacia Semajno de Amikeco kaj Afriko
p.7 Premioj al gelernantoj de Instituto Zamenhof (IZo)
p.8 Karitate en Goma; p.8 Forpaso de Théophile Mayoma

Tio alireblas ĉe https://drive.google.com/file/d/1ILxlPyvinnc7Xn28WRRXjiad8sPmBmS7/view

**Donaco al la Afrika Fondaĵo de UEA spronos la progreson en Afriko, kaj la sukcesan realigon de la oka Afrika Kongreso en Tieso, Senegalo.**

# AMO-reklamo

## Jen nia reklamo pri AMO de nun en la novan jaron

## AMO 78 konkretigita – planata programo

AMO 78 kadre de la 6-a Memorialo Lucija Borčić. Novembro 13-14. Temo: Literaturumi traduke. Tempo: UTC+1 (tio estas CET post la fino de la somera tempo).

### sabato, la 13-an de novembro:

13.30h enkonduko/Malfermo de AMO-Seminario 78
14.00h AMO-Seminario 78 sekvata de koncerto, ekde 17.30h.

### dimanĉo, la 14-an de novembro:

13.30h Proklamo de la rezultoj de la 5-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić"
14.00h AMO-Seminario 78
17.30h Fermo de AMO-Seminario 78 kaj 6-a Memorfesto "Lucija Borčić", Koncerto.

La seminario okazos per ZOOM. Aliĝu senpage per mesaĝo al: : hes.keu@gmail.com
ĉe la aliĝo oni aldonu: nomon kaj familian nomon, urbon, landon kaj ĝustan retadreson.
Limdato por aliĝo: 11-a de novembro je la 12-a horo (UTC+1)

## AMO 79 konkretigita –planata programo

Kunlabore kun IKEF, niaj komercistoj. Dimanĉe, la 28an de novembro. Trihora programo ekde 12:00 UTC (do, 13:00 laŭ Centreŭropa Tempo (CET). Provizora programo:

Malfermo de la Zomejo.
Bonvenigo de la gvidanto (Yas Kawamura)
Enkonduko de la patro de AMO, Stefan MacGill (SMG)
Salutparolo de la IKEF-prezidanto, Ĉielismo.
Salutparolado de la estrarano de UEA pri Faka Agado, Amri Wandel
Tema prezentaĵo, Paŭzo muzika, Tema prezentaĵo 2
Industria ekskurso (Enhee Chimidsteren - EC), sekvata de koncerto.
Lastatempaj agadoj de IKEF (EC)
Konkluda parolo de la IKEF-prezidanto, Konkludo de SMG
Fermo kaj danko (Yas Kawamura)
Libera diskuto (moderatoro: EC)

## AMO 80 temaro jam anoncita

La subtemaro estas jam komunikita per EKO 41. La organiza teamo estos: ATTAGLO Kokou Evieyneame, KOUEVIGAN Koffi kaj GBEGLO Koffi. La seminario ekos je 14:00 UTC kaj loktempe en la 23a kaj venos al fino tiam tagmeze en la 25a. Post la seminario ekos la 28a Togolanda Esperanto-Kongreso.

# AMO 81 alstrebata por nova lando - Aŭstralio

Diskutoj daŭras trans la tempozonoj, por realigi tiun seminarion ene de la dulanda kongreso (Nov-Zelando-Aŭstralio), okazonta en Sidneo inter la 7a kaj 13a de januaro, 2022. Proponita temo: "Oceania kulturo al la mondo per Esperanto."





La indiĝenaj kulturoj de Nov-Zelando, Aŭstralio kaj la sud-pacifikaj estas absolute malsufiĉe konataj en la cetera mondo. Kia mirinda eblo por Esperanto komuniki tiujn kulturajn valoraĵojn. Seminario povus esplori, kiel agi por realigi tion.

# AMO 82 strebata por Azia rejunigo

La AMO-teamo aliris movadanojn en Ĉinio, Koreio kaj Japanio por pretigi seminarion pri la granda aĝigo de la membroj de UEA tra tiuj landoj. Respondis ĈEL, kaj ni provadas kun ili pri organizado de seminario en la februara-aprila periodo.

====AMO=====oooo====AMO====

## Fervoja historio en Tanzanio

En la 1-a de novembro 2021, je 19:30 CET (UTC+1) okazos prelego kun la temo:

**D-ro Ernst Kliemke – respondeculo por orientafrika fervojo**

La prelegon pri la interesa berlina esperantisto kaj prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (1925–1929) Ernst Kliemke faris Roland Schnell jam en la virtuala Transponta Esperanto-Kongreso kadre de la faka programo de IFEF. Kliemke ja kiel direktoro de la orientafrika fervoja kompanio en la tiama germana kolonio organizis la konstruon kaj funkcion de metroŝpura fervoja linio inter Daressalam kaj Tanganjika lago. Aŭskultu nun reale la prelegon en Esperanto-butiko. Roland Schnell priskribas la defiojn alfrontatajn, kiam Kliemke planis kaj realigis la projekton, parolas pri la tasko de la linio, la rolo de Kliemke, pri liaj ideoj kaj vizioj.

Maldekstre: La stacidomo en Dar-es-Salaam en 1973, kaj dekstre, nun.





## Kongo DR kun nova estraro

Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) havas novan estraron ekde la 4-a de oktobro 2021. Delegitoj el diversaj kluboj ĉeeste kaj ankaŭ rete voĉdonis por havigi al la landa asocio novajn estraranojn por anstataŭigo de la malnovaj, kies oficperiodo finiĝis de pluraj monatoj La ĉeesta kunveno okazis ĉe la lernejo "Saint Vincent de Paul" en la paroko Sankta Rita, dum la retaj voĉdonoj alvenis ĉe: balotado2021@gmail.com. Post kalkuloj de voĉoj por la diversaj postenoj, kiuj havis kandidatojn, kaj post interkonsento inter la novelektitaj estraranoj kaj la elekta komisiono, la nova estraro de DKEA jene prezentiĝas:

1) Prezidanto: Jean Bosco Malanda
2) 1a Vicprezidanto: Alphonse WASEKA
3) ĝenerala sekretario : Alexandrine Omba
5) Kasistino: Monique BADIENGISA
6) Kultura konsilanto: Honoré MAFUILA
7) Administra kaj Financa konsilanto: Arlain KIZEYIDIOKO.

Kun la ĵus elektitaj estraranoj estas permesite esperi novan blovon por la antaŭenigo de la landa Esperanto-movado kaj de la tuta afrika Esperantujo. Gratulon al la elektitoj kaj fruktedonan trijaran mandaton al ĉiuj!

Nome de la Elekta Komisiono, Florent Ntoto

## Profitu el la hispana kongreso

Se vi ne povis spekti la sciencajn programerojn de la 79a Hispana Kongreso, jen unu el ili: “Kio estas semida lingvo?” de Ricardo-Felipe Albert Reyna: https://youtu.be/ep-WDOeh8CE

mga (Fonto HEF)

========= vortoj: 920 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone

al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François Lo Jacomo

**ENHAVO**

- Desire Rabevazaha
- AMO 78-82
- Tanzaniaj Fervojoj
- DR Kongo – nova teamo
- Semidaj lingvoj